

## **MONTROFENESTRA PLURLINGVECO**

La lingva sistemo de Eŭropa Unio oficiale nomiĝas "la plurlingvismo", sed ĝi praktike igas al hegemonio de unu nura lingvo : la angla. La oficiala raporto de profesoro François Grin, antaŭ nelonge transsendita al la "Alta Konsilantaro de taksado pri la lernejo" laŭ la peto de la Ministerio pri nacia klerigado en francio, mezuras la financon koston de tiu lingva situacio por la Unio.

- "La Unuiĝinta Reĝlando nete enspezas, ĉiujare minimume dek miliardojn da eŭroj pro la nuna superado de la angla lingvo ;
- "Se oni enkalkulas la multobligan efikon de iuj elementoj de tioma sumo, kaj ankaŭ la rendimenton de la kapitalo, kiujn la anglalingvaj landoj povas alimaniere investi pro la privilegia pozicio de sia lingvo, tiu ĉiujara sumo altiĝas ĝis 17 aŭ 18 miliardoj ;
- "Tiu cifero ne enkalkulas la diversajn simbolajn efikojn (ekzemple la avantaĝon profitantan al la denaskaj parolantoj de la hegemonia lingvo en ĉia situacio de traktado aŭ de konfliktado disvolviĝanta en ties lingvo) ; dume tiuj simbolaj efikoj havas sendube ankaŭ materiajn kaj financajn sekvojn."

Fronte al tiu konstato pri lingva maljusteco, la Eŭropa Unio devas konsideri la rekomendojn de UNESKO favorajn al esperanto kaj ankaŭ la konkludojn de la raporto de la profesoro Grin, laŭ kiu "la scenaro 'esperanto' ŝajnas la plej avantaĝa, tial ke ĝi tradukiĝus per neta monŝparo por Francio je ĉiujare proksimume 5,4 miliardoj da eŭroj, kaj per neta monŝparo por tuta Eŭropo je ĉiujare ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj. [...] 85% el la eŭropa loĝantaro trovas tiel evidentan kaj senperan intereson, sendepende de la politikaj kaj kulturaj riskoj entenataj en la lingua hegemonio."

## **JUSTA LINGVO POR JUSTA POLITIKO**

La movado por la internacia lingvo esperanto proponas tri konduktliniojn ebligantajn veran plurlingvecon kaj aliron al kultura diverseco por ĉiuj eŭropanoj :

1. La kultura diverseco ne devas prisuferi la lingvobarojn. Esperanto estas kultura lingvo, sed ĝi estas ankaŭ lingvo ebliganta aliron al ĉiuj kulturoj. Nur per interkomunikado pere de neŭtrala lingvo la eŭropanoj povos eksperti interkompreniĝon kaj dispartigon de siaj kulturoj.
2. La Eŭropanoj ne estu senigitaj je internacia komunikado. Estas evidenta la bezono de internacia helplingvo en Eŭropo konsistanta el baldaŭ 23 oficialaj lingvoj. La eŭropanoj ne povas kontentiĝi per unu lingvo regeblan nur de iu elitara. Same kiel en Hungario, ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio devus havi eblecon lerni esperanton, lingvo de ĉiuj regebla kaj ellernebla 10-oble pli rapide ol la angla.
3. Vera plurlingveco estas ebla. La promocio de la lingva diverseco ne devas esti limigita en la lernado de du fremdaj lingvoj inter kiuj estu la angla. La unua lernita fremda lingvo utilas kiel modelo por la postaj lingvolernadoj. En tiu rolo de transiriga lingvo, la kvalitoj de esperanto estas agnoskitaj. Ĝia lernrapideco kaj ĝia reguleco ebligas alfronti sentime la aliajn lingvojn kaj ellerni ilin pli rapide.